

Bona Espero



Cirkulero 68

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

novembro 2007

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ ☎ +49-(0)2902-911323 ★ ✉ u.nelken@t-online.de



Karaj geamikoj,

komence ni petas pri via kompreno, ke ni pro diversaj personaj kialoj nur nuntempe povis finpretigi la rondleteron al vi.

Sed tiel kompreneble ankaŭ eblas raporti plu, ĉar fine Bona Espero festis ja ĉi-jare sian 50-jaran ekzistadon. Post sia fondo en la jaro 1957 per 7 brazilaj Esperantistoj la institucio travivis tre ŝanĝiĝan historion. Mallonge antaŭ la definitiva fiasko de la tuta projekto Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia en 1974 savis la pluekziston de la infanvilaĝo. Ili ĉesis sian tutan ĝisnunan sekuran vivon kaj sukcesan karieron, elmigris kun siaj du filoj al Bona Espero kaj de nun dediĉis sian tutan vivon al la laboro kun malavantiĝitaj infanoj. Per ilia nelacigebla engaĝiĝo pliboniĝis la vivkondiĉoj de la bieno-lernejo kontinue ĝis hodiaŭ kaj ebligis nur tiel la jubilean feston je la 1-a de julio.

Nun Petra kaj Bernd Schönberner priskribas siajn tre personajn ĉi-rilatajn impresojn:

“Volonte ni sekvis la inviton al la grava soleno de Bona Espero. Nia lasta vizito tie ja okazis jam antaŭ 13 jaroj.

Por la festo oni estis planinta kaj preparintaj ĉion perfekte. Kelkaj gastoj (Daniella el Italio) kaj eksgelearnantoj jam estis tie kaj helpis ĉe la restaj preparoj. Oni dekoraciis la grandan halon de la



Os Fundadores



1965



1979



1988



1996



2005

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ☎ Hirschfeldstr. 3 ☎ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328 ✉ dagmar@rahn76.de

pasintjare konstruita Kultura Centro per aerbalonoj kaj tabla ornamo. La edzino de ekslernanto tuttage kudris tablotukojn, la infanoj provludis por sia grava sceno, kaj en la kuirejo oni diligente laboris, ekslernanto tondis la hararojn de la infanoj, alia organizis la aranĝojn de seĝoj kaj tabloj, - sed ĉiu sen hasto.

Je la tago antaŭ la granda festo mi kiel DON ESPERO aranĝis malgrandan magian prezentadon por la infanoj. La demandoj pri miaj trukoj estis la samaj kiel en Germanio. 'Bonvolu, Bernd, malkaŝu al ni, kiel vi faris brazilan monon el paperfolio! - Aŭ minimume kiel vi sorĉis la multajn bombonojn!' La infanoj nur estis kontentaj, post kiam mi klarigis kelkajn truketojn al ili.



Iom post iom ĉiuj eksterbienaj gastoj venis

al la festo. Buso el Brasilia, alia kun eksgelelernantoj de Bona Espero el najbara urbo, gastoj el Alto Paraíso (inter ili la plejmaljuna geedza paro, kiu ankoraŭ spertis la komencan vivon en la bieno-lernejo) kaj najbaroj. Ankaŭ ni ĝojis ĉirkaŭbraki kelkajn eksulojn: Amanda, Rosamira kaj Andrea kun bebo. - Ĉiuj eksbonesperanoj sentis same kiel ni. Komence oni nur staris sur la tereno, miregis kaj admiris la novan, ŝanĝitan Bona Espero, sed samtempe tute perdiĝis kortuŝitaj pri rememoroj (parte kun larmoj de emocio). - Baldaŭ la halo pleniĝis de ĉ. 200 gastoj. La infanoj prezentis al ili sur pletoj diversspecajn pecetojn, buletojn kaj plenigitajn frititajn terpombuletojn. Aldone ili elverŝis bongustan sukron el marakujo.



La oficiala parto komenciĝis per prelegoj kaj salutvortoj. Ursula kaj Giuseppe honoris multmeritajn eksbonesperanojn. Finfine Ursula simbole surmetis kronon al Adarci. Mi ĉifoje kiel reprezentanto de nia subtena organizaĵo laŭde aprezis per mallongaj salutvortoj la nelacigeblan laboron de Ursula kaj

Giuseppe same kiel pli kaj pli de Adarci. Mi promesis, ke nia organizaĵo ankaŭ estonte subtenos Bona Espero.

Adarci komencis la hejmecon parton per la 'naturdanco' ekzercita kun la infanoj. Ĉiuj gastoj estis entuziasmaj pri ties esprimplena prezentado.



Kaj ne nur Tota filmis ĉion, sed ofte ankaŭ fulmlumis la fotoaparato de iu gastoj, kiu ŝatis konservi por si mem tiu ĉi belan, buntan scenon. Igor recitis longan poemon en Esperanto, kiun tradukis tri kunlernantoj en la portugalan.

Kiel tagmanĝon oni surtabligis terpomsalaton, (kompreneble) faziolojn kun rizo, papriko kun kolbaso, salato kun blanka brasiko kaj multajn fruktojn. Ĉio majstre organizita !

Okopa grupo de muzikistoj, konata per la televido, ĝojigis nin per operaj arioj, pecoj el popularaj muzikaloj kaj ŝtupo-danco ĉe ' I'm singing in the rain '. Kiel aldonon ili kantis kune kun Ursula kaj Giuseppe esperante la 'Ĥoro de la malliberuloj' de Verdi. La grupanoj jam ofte estis gastoj en Bona Espero. Kuko kaj glaciaĵo por ĉiuj ĉesigis la belan jubilean feston.

La busoj kun la vizitantoj baldaŭ forveturis, ĉar jam ekmalheliĝis. Ni restis ankoraŭ kelkajn tagojn kaj priparolis la kulminojn de la bela festo kune kun Ursula, Giuseppe kaj Adarci. "

Kompletigante al ĉi tiu detala raportaĵo Ursula skribis al ni:

"Koncerne nian grandan feston mi unue ŝatas menciigi, ke unu el la fondintoj, Ines Nunes Machado, faris la festprelegon kun verve, malgraŭ ŝiaj 80 jaroj. Pli ol 40 esperantistoj el Brasilia partoprenis, lokaj aŭtoritatoj, ekslernantoj kaj amikoj. Por 200 gastoj ni sukcesis kunigi 160 seĝojn! Vera miraklo! Kaj telerojn, plenajn je bongustaj manĝaĵoj ni havis sufiĉajn.

Giuseppe kaj mi longe pensis, kian donacon fari al Bona Espero okaze de la 50jara jubileo. Laŭ nia ideo necesis naĝbazeno, ĉar naĝado en nia lago intertempe estis tro



danĝera pro anakondo. La financoj de la institucio neniam permesus aĉeti naĝejon. Tiel ni aĉetis la bazenon plimalgrandigante la heredaĵon de niaj filoj. – Kaj neniu estis pli taŭga por inaŭguri ĝin ol Bernd Schönberner, la vicprezidanto de la Subtena Asocio, kaj lia edzino Petra, kune kun Daniella Grassini, kiu kvankam blinda, saltis kiel unua en la malvarman akvon ! Nur poste la infanoj konkeris sian naĝbazenon.

Ildete, la fratino de Clarimundo (Tota), en Japanio, kiel gasto de Oomoto movado, vere furoris dum monatoj. Ŝi tie prelegis kaj ankaŭ instruis esperante en pluraj kluboj.

En julio aperis en la revuo 'Lingua Portuguesa' kun grandega sukceso sur 6 paĝoj kun 5 fotoj raporto pri Bona Espero. Tiu ĉi estis la rezulto de 24hora vizito de konata radio- kaj gazetara ĵurnalista paro, kiu estis profunde impresita de la bonegaj kondiĉoj en lernejo kaj ĉiutaga vivo de la infanoj ĉi- tie.

Louisa, la bebo de Maria, havas malsanan koron, same kiel ties fratino Isabella. La patrino nun fine povas ekzaminigi ambaŭ en la plej bona korinstituto de la tuta lando, sed nur post interveno de nia amiko, la marmilitista direktoro.”

Sed ne nur la infanvilaĝo ĉi-jare retrorigardas al sia 50-jara ekzistado. Jam en majo Ursula kaj Giuseppe same festis 50-an jubileon, nome tre personan de ilia edzeco.



Mia edzino Uschi kaj mi bedaŭrinde nek povis vojaĝi al tiu ĉi speciala okazaĵo nek al la granda soleno en Bona Espero. Anstataŭe ni elektis aprilon por nia kvara vizito tie.

Ni alvenis ĵus por sperti la multspecajn preparojn por la paska festo. Tre



lerte kaj ideoriĉe Adarci scipovis entuziasmigi la infanojn por la verkado de dekoracioj. Dimanĉo

matene speciale riĉenhava kaj bongusta matenmanĝa bufedo atendis la infanojn, kunlaborantojn kaj gastojn, pretigita per multe da amo kaj klopodo ĉefe de Ursula kaj Adarci. Krom ni ĉeestis ĉi-tage kiel gastoj ankaŭ la filo de

Ursula kaj Giuseppe, Dario, kun sia edzino kaj siaj du gefiloj, same kiel la

pola esperantisto Roman Dobrzynski kaj najbara familio. Infanoj kaj plenkreskuloj havis multan plezuron ĉe la posta serĉado de bone kaŝitaj 'paskaj ovoj'. – Ne nur ĉi-tage preskaŭ la tuta ĉiutaga vivo okazis en la nova Kultura Centro: ĉi-tie oni laboris, lernis, kuiris, manĝis, ludis kaj festis, kaj ĉio nedependa de la kapricoj de la vetero.

Roman, konata esperantisto, televida ĵurnalista kaj verkisto montriĝis kiel interesege kaj tre simpatia najbaro en la gastodomo 'Flordomo'. Ekde kvar monatoj li kolektis informojn por kroniko pri 50 jaroj Bona Espero kaj ĝiaj pli ol 400 infanoj. En Brasilia nin impresis la publika, solena lanĉo de la portugala traduko de lia deka libro 'La Zamenhof-Strato', en ĉeesto de la pola ambasadoro kaj aliaj aŭtoritatoj. Ĝis nun oni jam tradukis tiun libron el la Esperanto en 17(!) aliajn lingvojn. Li priskribas tre impresive la vivon de Prof. L. Salewski-Zamenhof, la nepo de L.L. Zamenhof, kaj inter alie ankaŭ ties specialan rilaton al Bona Espero. – Roman sukcesis ankaŭ kiel bonega instruisto, ĉar vespere la infanoj ĉiam scivoleme atendis la daŭrigon de la konata instrua filmo "Mazi en Gondolando", la bazo por liaj Esperanto-lekcioj.

Adarci kaj Maria regule instruis la klasojn 1 ĝis 4 matene kaj posttagmeze paralele en du ĉambroj de la Kultura Centro. Speciala avantaĝo estis por Maria, ke ŝiaj du filinoj ĉiam estis proksime, aŭ la 7jara Isabella aŭ same (tute proksime) la ĉarma 4monata Louisa. La malgranda familio vivis kune kun la grupo de la knaboj kaj la paro Grattapaglia en la 'Sunhejmo', dum Adarci kun filo Igor kaj la knabina grupo loĝis en la 'Librodomo'.

Orlando kaj Valdemar zorgis pri ĉiuj agrikulturaj kaj metiaj laboroj, ofte per la instrukcio de Giuseppe. De lundo ĝis vendredo Susi, la edzino de Orlando, kuiris por ĉiuj. El la kunlaborantoj ŝi cetere estas la sola, kiu ne grandiĝis en Bona Espero. Semajnfine Ursula kaj Adarci alterne laboris ankaŭ en la kuirejo, kie Uschi ofte provis helpi iomete.

En sia libera tempo la infanoj ofte kaj tre gaje biciklis. La multajn biciklojn ili dankis al la pli ol 80jara dano Erik Mortensen. Dum lia vizito kun lia edzino Astrid li funkciigis tiujn per ege klopoda, detala laboro el donaco de multaj tute rompitaĵoj.



Kiel malfacila estas kontinua laboro kun la 25 ĝis 30 infanoj por la malmultaj zorgantoj ni povis mem sperti dum nia ĉeestado. La kreskantaj problemoj kaj la ofte malfacile traktebla konduto ĉe la infanoj, ekz. litpisado ankoraŭ ĉe la pli aĝaj, kaj la neceso de pli da atento por speciale traŭmitaj aŭ pli junaj (parte nur 5 j.) infanoj postulas vere pli da kunlaborantoj. Tre konsternis nin la tute surpriza nokta 'fuĝo' de la du plej aĝaj knabinoj (14 kaj 15 j.), kiujn ni ĉiam rimarkis kiel tre afablaj, helpemaj kaj zorgemaj. Ili postlasis ja kortuŝan dankleteron por Adarci, sed sen klarigoj pri sia konduto. Ĉar ili jam havis seksajn kontaktojn kun viroj, oni supozis, ke ili preferis tiun 'pli facilan vivon' (laŭ sia opinio) al la postuloj de bona lerneja klerigo kaj al la reguligita ĉiutaga vivo. Efektive oni jam urĝe petis pri la akcepto de kvar novaj infanoj.

Ni ĝojegis pri la renkontiĝo kun Amanda, iama lernantino de Bona Espero. Antaŭ ĉ. 10 jaroj ŝi estis nia unua gasto de tie dum sia unujara restado en Germanio post sia abiturienta ekzameno. Dum nia unua vizito en la bona lernejo poste ni jam vidis ŝin kiel instruistino en la elementa lernejo de Alto Paraíso. Intertempe ŝi ne nur estas la patrino de 8jara knabo, sed sukcese kaj kontente laboris en la sama urbo kiel kvazaŭ mastrino en larĝa, luksa hotelo.

Specialan, ne atenditan jubilean donacon ricevis Bona Espero per pluraj aktivaj gimnasianoj el Warstein. En somero 2006 Adarci kaj Igor informis multajn gelernantojn pri Brazilo kaj aparte la infanvilaĝo. Antaŭ ĉio Adarci tiam impresis la 17jaran Patrick Risse tiel, ke li tre klopode organizis kune kun aliaj gelernantoj grandegan braziltipan donacfeston en Warstein. Per la subteno de kelkaj firmaoj, multaj homoj, ĉefe instruistoj (i.a. kiel DJ) tiu projekto sub la moto 'Gaje donaci' rezultigis grandiozan finan-



sukceson. Eble sub la influo de ĉi-tiu ideo poste la teatra laborgrupo de la sama lernejo decidis donaci same la netan inspezon el ĉiuj tri prezentadoj ankaŭ al Bona Espero. Tiel la lernantoj dum la ĉi-jara vizito de Adarci povis transdoni al nia subtena asocio per

simbola ĉeko la klare plej altan individuan mondonacon. Kompreneble ni dankas ĉiujn tutkore, kiuj iamaniere sukcesigis ĉi-tiun agadon.

Ni dankas ankaŭ al la Mariengrundschnle el Meschede, kiu denove kiel ekde multaj jaroj kolektis grandan sumon por Bona Espero. Same al la lernejo 'Berufskolleg Meschede' (laborejo de Bernd Schönberner), kiu kiel jam antaŭe subtenis la infanojn per multe da mono. - Kiel anstataŭantoj por ĉiuj aliaj subtenantoj ni ĉi-foje dankas al Walter Pohl el Münster, kiu okaze de sia jubilea naskiĝtago petis nenion kiel mondonacon por Bona Espero, kaj familio Gerke el Warstein same kiel Olaf Lindner el Berlin, kiuj ekde multaj jaroj regule subtenas la infanvilaĝon per altega monsumo.

Tiuj ne atenditaj abundaj mondonacoj ĉi-jare certe nur estas escepto. Sed ili estis tre bonvena, ĉar pro la ĉesigo de pluraj grandaj publikaj financsubtenoj la sumo de la mondonacoj draste malgrandiĝis. Sed aliaflanke la problemaj infanoj kaj kun tio kompreneble ankaŭ la postuloj por la zorgantoj pligrandiĝas – kiel la paro Schönberner kaj ni persone povis sperti. Tial estus tre dezirinda, ke ankaŭ estonte nia subtena organizaĵo per la entute kolektita mono fidinde povas sekurigi finance la vivtenon de la infanoj kaj ties kompetenta, sukcesa prizorgado!

Per ĉi-tiu urĝa deziro mi ligas denove mian koran dankon al ĉiuj donacintoj kaj helpantoj, salutas same ĉiujn novajn geamikojn de nia 50jara juna, ankoraŭ ĉiam sukcesega Bona Espero kaj deziras al vi ĉiujn ĉiurilate ĉion bonan!

*Via
Otto Nelken*

EN BONA ESPERO

de William Auld (el revuo "Fonto")

Kolibro paŭzas antaŭ magnolio
Balenomont' serenas super ĉio
Venteto freŝa tra l' folio blovas
Cent metrojn for, la univers' senmovas.

Akveroj el ŝprucil' arĝentas dance,
Dum en hamak' mi lulas min balance
Kaj jen altrotas mulo laŭ la pado :
Alvenas lakto por la kuirado.

Ĉi tie regas paco kaj trankvilo:
La infanetoj ridas kun facilto,
Ĉar el la hejmgemastroj am' radias
Sub verdas flago orfoj familias.

Aĥ, for la ungoj, stultaj mondregantoj,
Vi kvazaŭdiaj kvazaŭomgigantoj,
Kun via politika katastrofa
Nanigas vin ĉi loko zamenhofa!

Bona Espero, la 3-an de aŭgusto 1981

